

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

LA KINEMATOGRAFILO

(De MAKSIMO FORMONT.)

Francisko Cibovo eniris la kinematograf-teatron. Ĉe la kvina vico, du sidlokoj estis neokupitaj, apud la elirejo; li lokis sin sur la lastan seĝon, por havi nur unu apudulon, maldekstre. La seĝo, lasita de li, tuj estis sursidita de viro, kiu estis eniĝinta la halon, samtempe kiam li. Kun mieno de trankvila kontenteco, Cibovo sin surŝovis, lia dorso bone internigita en la velka, sed ankoraŭ mola veluro de alorkestra apogseĝo, liaj piedoj plaŭdantaj sur la tapiŝo malatentan marŝon. Efektive, kial li ne estus kvieta? Ĉu estis videble sur lia vizaĝo, ke li krimmortigis maljunulinon en vilaĝaĉo el Iulando, tri semajnojn antaŭe, kaj ke, provizite je ŝia ŝparajujo, li veturis la ĉefurbon, la unuan de l'mondo, por sin amuzi kaj forkaŝi?

Certe, en tiu momento, li estas tiel kvieta, kiel lia proksimulo, ruĝetvizaĝa simplulo, kun kuniklopiedformaj du vanghartufoj, malpli pipr- ol salkoloraj, kolumo malnovmoda, kaj blanka kravateto x-forma. Sendube, iu kampara notario, kiu kredas diboĉi, tie erarigante siĝn belaspektan rediĝoton, el multkosta drapo, butonumitan kaj rigidan, ŝajne detranĉitan el ladplato.

En la ĉambrego fariĝis mallume, la multkolorigita per afiŝoj kurteno leviĝis, lasante vidata duan, tute blankan, dum premkornoj ekludis unu el tiuj melodioj kune sentimentalaj kaj malicaj, kiujn ŝatas la ĉirkaŭurbanoj. La animo de Cibovo jam eksentis emon al tre pura kortuŝiĝo; li ekrevis pri siaj provinco kaj unua komuniĝo. La ensorĉado estis tiel profunda, ke li eĉ ne prenis liberton legi, sur la giganta afiŝo, la elmontron de l'spek-

taklo. Nek ankaŭ la atenton dediĉitan al li de lia apudulo, la burĝo kun metala jako kaj « Johaneta » kolumo, li rimarkis.

* * *

Palpebruma, sed adorinda vigleco, pejzaĝo, enkadriĝis en la luman rektangulon: herbejo, ĝis nevideble, bovinoj ĉe paliso, tuta solaj sur la kamparo, floritaj pomujoj, faskoj da torditaj arboj ŝirmantaj la farmdomojn kontraŭ mara vento. Francisko Cibovo rekonis sian Iulandon, pri kiu li ĵus pensis kun romanca melankolio. Kaj denove, la animo de l' mortiginto dronis en nebulego de l' pasinto. El tiu palega kaj tremadanta pentraĵo, el tiu spektra naturo, kiu ŝajnis tute ekkaptata de l' danca malsano, reve sin apartiĝis la amara kaj sanigaodoro de l' paŝtejoj. Francisko Cibovo eĉ retrovis, en sia buŝo, la guston de l' butersurpanaĵoj, tute orumitaj, kiujn li manĝadis, siajn bovinojn gardante, kiam li estis junuleto.

Li ektemis.

Tiu vojo, kiu serpentumis tra la lando, borderita de stelplenaj dornstipoj, ĉu ne estas tiu, kiu kondukas al Brehalo? Kaj tie, maldekstre, tute antaŭe, tiu sola domo, je tegmento el florita pajlo elstaranta la murojn, ĉu ne estas, mia Dio! la kajuto de Berenico, tiu maljuna farmistino, riĉa kiel Krezuso, pedikhava kiel Lazaro, mortigita de li tri semajnojn antaŭe? Pro kiu kaprico tiuj ĉefurbanjoj estis elektintaj ĝuste tiujn ĉi landojn kaj budeton por ilin enmeti en sian magian lanternon? En la regiono ja ne mankis pli plaĉaj lokoj, nun kiam ĉiupase renkontiĝas fotografistoj aŭ pentristoj, amaso da mallaboremuloj, speciale por ilin kopii venintaj. . . .

* * *

La pejzaĝo malaperas, restas nur la Berenica domo, izolita sur la vojega bordo.

Eniras viro la ortangulon blindige lumigita meze de tiu nigrego, kiu plenigas la scenejon kaj la ĉambregon. Unue lia vizaĝo ne estas vidata, sed, iumomente, li returniĝas. Cibovo krion sufokas. Sian propran spektron li havas antaŭ si, nun. Lian krimon rakontas la kinematografilo.

Li sentas sin fariĝi freneza.

Li ne memoras, ke la gazetoj publikigis lian fotograf-aĵon, je la unuaj tagoj post la krimo, ke ĝin li vidis mem; ne memoras plu, ke li legis artikolojn, kiuj rakontis, ke ĉiuj en la lando montradis lin kiel la mortiginton.

Li ne pensis, ke la kinematograf-industriistoj faras, per siaj pentraĵoj, ĵurnalismen siamaniere kaj ili riĉigas sin, ilustradante la okazaĵojn, kiujn publikigas la gazetoj, tagon post tago. Li eĉ ne scias, li, kamparano, brutulo bestigita de alkoholo kaj malvirto, kiamaniere la malvolviĝantaj antaŭ liaj okuloj scenoj estas preparitaj, per figurantoj, kiujn manovrigas administranto, kaj kiujn oni artifikas laŭ cirkonstancoj. Li scias neniom, ne komprenas. Li terurigas.

Malmulte li kredas je Dio, sed la teruron de la sorĉarto li konservis, kaj la mistera kinemato ĉiam ŝajnis al li diabla.

La apuda notarvizaĝa viro sin ne ĝenas plu por lin observi avide. Cibovo ne pensis atenti tiun tro scivolan flankulon. Oskedante, palega, agitata de daŭra tremo, kvazaŭ li havis febron, li rigardas sekvi unu post alia, la pentraĵojn, la fazojn de sia krimo, kiujn genia enscenigisto restarigis per la konoj liveritaj de l'enketo, la fotografajoj, la gazetkomunikaĵoj. Se estas iuj neĝustaĵoj, ilin li ne vidas, lia agito estas tro granda, kaj li ne maltimus kontraŭmeti siajn malkvietegajn, malcertajn membrojn al la kulpiga, ne pardonema, kvazaŭ supernatura neteco de tiu desegnaĵo, kiu moviĝas, kiu vivas, kiu krias kontraŭ li.

Jes, tiel okazis. La maljunulino estis dormanta, same kiel nun... ŝin li kaptis gorĝen, kiel nun ankoraŭ... ŝi provis lin mordi... ŝin li sufokis... la monon li elprenis... forkuris... sian bastonon forgesis... tie... sur la kahelo... Jes, estas ja tiele.

La aktoro, kiu pentris sian kapon laŭ la lia, esprimas, per la teatraj dikigantaj procedoj, kruelecon unue, poste teruron de l'malhonestulo: li estas eĉ pli teruriga ol nature. Lin rigardante, aŭ prefere *sin rigardante* mem, en la plenumado de sia timeginda faritaĵo, Cibovo vidis senroman premsonĝon.

Sed la anonima dramverkisto ne nur enscenigis la krimon, li ankaŭ volis plene kontentigi la bezonon de moraleco kaj samtempe la naivan scivolecon de l'popolo.

Kaj la lasta pentraĵo (ne plu historia sed profeta) montras la punpagon.

Okazas sub la granda placo de Lourbo, je l'sunleviĝo.

La eŝafodo staras; alvenas ĉareto, kun du galopantaj ĉevaloj nigraj, ĉevaloj de l'morto; el la ĉareto malsupreniras viro, enkatengita, liaj manoj postdorse, lia ĉemizo eltranĉita je kolo. Brilas la tranĉhakilo. Moviĝas la popolamaso kiel grenkampo sub ventego: el la malfermataj buŝoj eliras sensona krio, kiun perceptas sola Francisko Cibovo: — Morton! — kriegas la popolamaso.

Lia samulo la gilotlinon alproksimiĝas, puŝate de la helpezekutistoj.

La brilega triangulaĵo estas tuj falonta.

Tiam la mortiginto, la vivanto, kies fantomo estas ekzekutata antaŭ li, ekkrias siavice.

*
**
*

Feliĉe, la elirejo estas tie, tute proksime. Cibovo starigias, atingas la pardonon, kelkpaŝe; jen li ekstere, kun tempioj batantaj, nebulo antaŭ okuloj, preskaŭ sveninta, sed libera, forkurinta la premsonĝon....

Tiumomente, mano surmetigias lian ŝultron.

La viro kun ridinda kolumo kaj provinca jako, la ŝajnigita notario, la policano Delpino, eldiras tiujn vortojn per kvieta voĉeto:

— Francisko Cibovo, je l'nomo de la leĝo, mi vin arestas....

(El « *Le Petit Parisien* ».)

Tradukis MAURICE DAVID.

☆☆☆

Estas jam proksime tempo de batalo pro libero —
Antaŭsignas ĝin al homoj luma stelo de espero.

Baldaŭ ver' en mond' ekregos, ekviviĝos nia revo;
Ni konstruos estontecon, — tio estas nia devo.

Devas ni triumfe venki aŭ oferi nin al morto....
Estu pretaj por batalo! — Nin al ĝi kondukas sorto....

Georgo Deŝkin.

LA MAJORO KAJ LA GRILO

Fabelo de KOT-MURLYKA (1).

Al la juna Esperantistaro. — (*Antaŭparolo de V' tradukinto.*)

La bona maljuna « Kato-Murmurulo » mortis. Ĉar la idealoj es-
primitaj en liaj ĉarmaj fabeloj estas tute similaj al la idealoj de la
Verda Standardo, mi elektis unu el tiuj, kiuj plej forte kortuŝis min
dum mia infanaĝo, kaj esperantigis ĝin. Li parolis pri la tuta homaro,
li parolis por la tuta homaro; tial lin aŭskultu la tuta homaro. Per
Esperanto tio estas ebla! Li parolis precipe por la infanoj, do aŭs-
kultu lin ĉiuj infanoj de la tutmondo.

Mi ne scias, ĉu la bona « Kato » aŭdis pri la triumfoj de nia
afero, sed mi estas konvinkita, ke se li tion estus aŭdinta, li estus nia
per sia tuta koro. Post pli ol dudekjara penado de la unuaj pioniroj
nia kara lingvo komencas venki la obstinecon de la blinda homaro,
de la « *malŝelica, kunligita homo* », laŭ la esprimo de la maljuna
« Kato ». Sed nur vi, niaj junaj adeptoj, kaj precipe viaj idoj parolos
la karan lingvon tiel bone, kiel vi parolas vian patran lingvon, la
belegan lingvon, kies genian perfektecon kaj riĉecon ankoraŭ multaj
el ni ne komprenas, ĉar oni ne povas bone senti la internan spiriton
de iu lingvo, se oni ĝin nur apenaŭ balbutas. Feliciaj vi estos, ĉar vi
estos okuligintoj de la tute esperantigita homaro, de la plenkreska
arbo portanta fruktojn de nia semado.

Vi estas nia espero, ĉar viaj kapoj ne estas infektitaj de sen-
sencaj antaŭjuĝoj, ĉar viaj puraj animoj kaj koroj estas plenaj de
amo al la homaro, ĉar viaj fortoj ne estas ankoraŭ konsumitaj de la
vivbatalado, ĉar vi ne mokas, ĉar vi havas sufiĉe da pacienco kaj
tempo por lerni perfekte nian karan lingvon.

Antaŭ malmultaj jaroj oni juĝis la ideon de internacia lingvo, en
plej bona okazo, kiel utopion, kiel revon, — multaj eĉ ĝis nun tion ne
ĉesas ripeti. Sed, tamen, tiu « freneza utopio », tiu « revo » jam efek-
tiviga. Vi kredu, ni deziru, ni esperu, ni penadu, karaj infanoj, ke
ankaŭ ĉiuj revoj de la bona « Kato » baldaŭ efektiviĝu.

R. FR.

— Hej! Johano! Altrenu la lokomotivon! Ni veturos tra
Ĥinujo rekte Jamajkon!

Kaj tuj Johano, soldato-servisto, alportas malgrandan vojaĝ-
samovaron el ruĝa kupro kaj metas ĝin sur la tablon.

Li scias tre bone, kion postulas la majoro, ĉar ĉiuvespere,
senescepte, la majoro veturadas tra Ĥinujo rekte Jamajkon.

Kaj alportis Johano la « Ĥinujon » en malgranda skatoleto,
kiu simpledire estas nomata teujo. Li alportis ankaŭ tekruĉon,

(1) « Kot-Murlyka » (= Kato-Murmurulo) estas pseŭdonimo de la rusa verk-
isto N. P. Vagner, profesoro de zoologio ĉe la S.-Peterburga universitato,
mortinta antaŭ du jaroj. (*Rim. de V' trad.*)

glason kaj la plej puran « *Jamajkon* » (!) en alta botelo kun orumita banderolo.

Trinkas la majoro glason, trinkas la duan. En la ruĝkupra samovaro rebrilas lia ruĝa vizaĝo kun ŝvitkovrita frunto kaj kun longaj lipharoj.

— Nu ! pensas la majoro, — nun mi estas ĝuste en Jamajko mem !

Kaj la samovaro bruadas : Ŝu, ŝu, ŝŝu ! jen dekkvin jaroj mi jam servas al vi. Mi partoprenis kun vi en diversaj militiroj, kaj diversajn aventurojn mi estas vidinta. Maljuna mi estas kun vi, multjarulo. Ŝu, ŝu, ŝŝu !

— Nu, tio estas malnova kanto. Ĉu vi ne havas ion pli novan ?

— Ŝŝu, ŝŝu, ŝuuu ! — bruas la samovaro. — Ankaŭ mi estis nova, juna kaj freŝa, sed tio estis antaŭ longa tempo, tio estas malnuna, malnova kanto. Naskis min al la mondo la patrino-tero malseka. Longe, longe mi kuŝis en ĝiaj internaj kaŝejoj. Fine mi ekvidis la lumon. Oni ĵetis min en fornon kaj tie — ŝu-u, ŝu, ŝu, — mi tute fandiĝis kaj versiĝis, ekfluis per fajra helega fluejo, — ŝu, ŝu, ŝu, — kaj jen mi malfluidiĝis, fariĝis brila peco da kupro. Oni ree komencis min fandi kaj forĝi... ŝtu, ŝtu, ŝtu, ŝtu, ŝtu...

— Aŭskultu ! Ĉu vi ne povus ĉesigi la bruon ? Rakontu, sed ne bruadu !

— Mi ne povas alie ! Tio jam estas mia kutimo, kaj la kutimo estas la dua natureco — ŝu, ŝu, ŝu — kiam oni la unuan fojon starigis min sur la piedoj, ĉio ekbrilis, ĉio rebrilis en mi kaj mi ekvidis la nigrajn manojn kaj la fajrbrunigitajn vizaĝojn de la laboristoj. Ili ĉiuj laboris kovritaj per ŝvito de siaj vizaĝoj kaj frapadis, bruadis — ŝu, ŝu, ŝu ! Ŝtu, ŝtu ŝtu ! Kaj kiam oni boligis en mi akvon la unuan fojon en mia vivo, tuj boleca vivo ekludis en mi kaj mi tuta ekbolis kaj kantis laŭtan, gajan kanton, ŝu, ŝuu, ŝuuuu ! Do-rememoru, malnova amiko : kiom da fojoj post longa kaj malpura vojiro, sub malvarma vento kaj nebula pluvo, vi kunsidadis en tendo apud mi, via malnova amiko ; viaj trajtoj brilis kaj lumis en mi, kaj mi vin trinkigis kaj varmigis, kaj kantis al vi mian malnovan kanton ! Ŝu, ŝu, ŝu !

— Ha ! ĉio tio ja estis ! diablo min prenu ! — ekkriis la majoro, — efektive ĝi estis ! Gaja, delonge pasinta militira tempo, — kaj li ellasis tutan nubon da fumo el sia longa pipo.

— Kie do ili estas nune, — daŭrigis la samovaro, — niaj maljunaj kuraĝegaj amikoj, botelkamaradoj bravegaj ? Unuj jam delonge falis sur sangokampo. Enviinda estas ilia sorto. Aliaj sin puŝis antaŭen, fariĝis generaloj. Sola, mi restis kun vi, kaj jen

(1) T. e. rumo de la insulo Jamaica. (*Rim. de l' trad.*)

sidas kun vi en soleco, en vilaĝa dometo. Maljunaj ni estas, maljuna mi estas kun vi, multjarulo ! ŝu ! ŝu ! ŝu !...

— Jes ! — diras la majoro — videble la ŝanco nin preteriris. Sed ni daŭrigu la vivadon, nin ne ĉagrenu, ĝis kiam venos fino de l' vivo, — kaj li eltrinkis la lastan glason. — Ho, se nur pli rapide mi al Jamajko alvenus !... Jes ! Jes ! Solaj ni restis kun niaj longaj lipharoj. Nu, tiajn longajn lipharojn havas neniu en la mondo, — kaj li ordigis siajn lipharojn kaj ilin ektordetis.

— Ĉili-tili, ĉili-tili ! Kia sensecaĵo, pura mensogo ! Mi havas multe pli longajn lipharojn ! Ĉili-tili, ĉili-tili !

— Kia kantulo ankaŭ aperis ! ekkriis la majoro turnante sin al la forno, kaj el post la forno rigardis grilo incitante la majoro per siaj longaj lipharoj.

— Ĉili-tili ! Ĉili-tili ! Ĉili-tili !

— De kie vi venas ? !
Bird' kia vi estas ? !
Restu ĉiu grilo
Hejme kun la trilo !

— Mi ne havas propran hejmon. Ĉili-tili ! Sed rekompence por tio mi sidas ĉiam post malpropra forno. Tio estas ja plej oportuna ! Mi sidas kaj kantas : ĉili-tili ! ĉili-tili ! Kaj se vi volas scii de kie mi venas, mi tuj raportos tion al vi. Ĉeestis mi, mia generalo, blatan balon, kiun aranĝis mia najbaro. Ĉar mi estas ne lastrangulo en nia angulo, tial min invitis lia blatmoŝto mem, la nobela Blato-de-Blatolando. Kio do ? Mi ne estas fierulo, mi venis. Ĉeestis multego da popolo. La tuta angulo post la forno estis plenŝtopita de blataro. Ili havis ankaŭ orkestron, sufiĉe bonan. Estis ankaŭ invititaj du kampaj griloj ⁽¹⁾, lokusto ⁽²⁾, burdo kaj kulo. La regalaĵo estis jena : seka pankrusteto, acidiĝinta fromaĝo kaj bovida osteto. Unuvorte ĉio estis *comme il faut*. La blatoj kondukis tre konvenmaniere. La maljunaj, kun gravaj mienoj, ordigadis siajn lipharojn. La junaj, kun sprono sur la piedetoj, piedsalutis antaŭ la sinjorinoj. Kaj la sinjorinoj estis ĉiuj tute amindaj blatinetoj. Aparte unu fraŭlino, maldika, flavruĝeta. « Fraŭlino, — mi diris — vi havas belegan malgrandan piedeton. Ĉil-til, ĉil-til ! Sed ŝi tuj kaŝis la piedeton sub la flugilon kaj mallevis al la tero siajn lipharetojn. » — « Min, — ŝi diris — ĉiam akompanas mia patrineto ; vi certe konas mian panjon ? Ŝi ĉiam portas tian grandan ovon. » Unuvorte : Karulineto, — blatinjo !

— Ha, la diablo min prenu ! — ekkriis la majoro, — mi ja

(1) *Gryllus campestris*, kiu vivas sur kampoj, kontraŭe al sia parenco *gryllus domesticus*, kiu loĝas en domoj, en kaŝlokoj de fornoj, ĉar ŝatas la varmon.
(Rim. de l' trad.)

(2) *Locusta viridissima* (saltakrido). (Rim. de l' trad.)

ankaŭ estis bravulo, kaj bravulo por kio ajn vi volas! — kaj li fintrinkis la kvaran glason.

— Ĉili-tili! Ĉili-tili! Ĉil! Til! Til! Kiu el ni ne estis juna? Mi ankaŭ memoras mian junecon. Sed tio estis antaŭ longe. Tio estis dum unu printempa vespero. Mi kantis tiel, kiel oni kantas la unuan kaj lastan fojon en la vivo. Mi kantis post granda kahela forno ĉe unu bienulo. En la ĉambro fluis odoro de siringo, odoro de la unuaj printempaj, blankaj kaj parfumaj konvaloj. Mi kantis per la tuta forto de miaj junaj kantoflugiloj, kaj fraŭlino, sidanta antaŭ la fortepiano per ĉiuj fortoj ludis la malnovan kanton pri tio, kiel la *Elfrego*, kun granda barbo kaj malhela krono, persekutis en malluma arbaro malgrandan knabeton. Ho, kiel ploris la knabeto, kaj kiel terure frapadis la *Elfrego* la klavojn! Tiel, ke la tuta fortepiano tremadis. Fine, la malfeliĉa knabeto mortis. Mallaŭtaj kordoj majeste trasonis en la aero kaj eksilentis por ĉiam. Kaj meze de tiu silento mi subite ekaŭdis murmureton. Mi ĉirkaŭrigardis — tio estis ŝi. Ĉu vi komprenas? Ŝi, la bona, kvieta kunulino de mia modesta, komforta vivo. Malgraŭ la frapado de la *Elfrego*, malgraŭ la tondrado de la ventego, ŝi tamen estis aŭdiata mian simplan mallertan kanton, kaj ŝi venis al mi! Ĉu vi komprenas, ke tio estis bona? Til! Til! Til! Til!

— Ha! — ekkriis la majoro ekfrapinte per la pugno la tablon, — tio ja efektive estis bona, sed mi neniam sentis ion similan, kvankam mi ankaŭ estis juna. Kaj mi ankaŭ memoras fraŭlinon Josefino kaj fraŭlinon Feliksino... Ho, polino bela, ne amindumu sen celo! Ha! Ĉu do baldaŭ mi alvenos al fraŭlino Jamajko?!

Kaj la majoro trinkis ankoraŭ unu glason, sed la kioman — tion eĉ li mem ne memoris.

— Kaj ni ekloĝis kun ŝi, — ĉiltilis la grilo, — ĉe la bienulo post la forno. Sed poste tedis al ni tie loĝi; krome, tio ne estis sendanĝera. Ni transloĝiĝis en bonan helan dometon, post varman fornon, sub altan arkajon. Ho, kiel bone estis tie al ni kun niaj malgrandaj grilidetoj. Mi rakontadis al ili fabelojn, ili petolis kaj saltadis. Dum mallumaj aŭtunaj noktoj, kiel la nuna, ŝi sidis apud mi, mia bona kunulino. Mi kantis mallaŭte al ŝi kanton, kaj la grilidoj dormis profunde; kaj dolĉe kaj tiel bone, varme, komforte estis al ni post la varma forno. Nia vivo malrapide ruliĝis plenonde kaj kantis al ni sian pacan, kvietan kanton. Til! Til! Til!...

— Ha, vi! — ekkriis la majoro — kaj diris plu nenion. Li nur pli forte alpremis al la koro sian longan pipon. Sed tio ja estis ne kunulino de la vivo, ĝi estis nur simpla militira pipo.

Kaj la grilo daŭrigis:

— Kaj mi rakontadis al ŝi senfine longan, malnovan fabelon pri tio, kiel batalas la domgriloj kontraŭ la kampaj. Antaŭe dum la malnova, malnova tempo, ĉiuj griloj estis unu popolo, kaj ĉiuj ili loĝis ne postulante komforton, en nestetoj sur libera kampo; sed kiam apud la griloj aperis la homoj, multaj el la griloj enrampis en iliajn varmajn dometojn. Ĉar kiu do, diru, ne serĉas por si lokon pli varman, pli bonan? Eĉ simpla fiŝo serĉas, kie estus pli profunde!

— Jes! Jes! — diris la majoro kaj mallevetis sian grizan kapon, ĉar li neniam serĉis, kie estus pli profunde; tial li nun dronis en la plej grandan profundon de Jamajko.

— Kaj jen, nur malrapide oni rakontis la fabelon, sed pli rapide ni, griloj postfornaj, fariĝis tute aliaj. Fariĝis ni popolo malsanema, malforta; la kampaj griloj fariĝis por ni tute fremdaj. Fortikaj ili estas kaj fortaj, sed kio rezultas el tio? Ni estas multe pli ruzaj, pli saĝaj, kaj jen la plej grava afero, ni estas bonegaj muzikistoj kaj fabelistoj. Ĝuste de tiu tempo naskiĝas inter ni malkonsento kaj malpaco. — « Vi, — diris al ni la kampaj griloj, — vi estas popolo malpia, postfornaj kantaĉuloj, arlekenoj! » Kaj ni respondas al il: « Vi ĉiuj estas sovaĝuloj malkleraj, manĝeguloj! » Nu, tial ni bataladas unuj kontraŭ la aliaj. Ni elrampas el post niaj fornoj, ni enviciĝas militorde en taĉmentojn; antaŭe saltas la griloj-muzikantoj, tien-ĉi-tien saltas la griloj-adjudantoj. « Antaŭen, fratetoj, antaŭen » — krias la griloj-generaloj!...

— Antaŭen! — ekkriis ankaŭ la majoro, vigle sursaltinte el la seĝo, sed tuj li sin apogis sur la tablon, ĉar la tablo, kaj la planko kaj ĉio sub li kaj antaŭ li balanciĝis, ĝuste kiel tio okazas sur la maro, sub ventego. Sed tio ne estis neordinara! Li ja estis veturanta Jamajkon, kiu kuŝas meze de la maro, kaj en lia koro furiozis forta ventego.

La grilo daŭrigis:

— Kaj jen komenciĝas inter ni batalego: la polvo kolone stariĝas, la fum' al ĉielo leviĝas. La kampaj sovaĝuloj akiras la venkon ĉefe per atako subita kaj forta. Ili kuras, tutkorpe rompante la baron, la kapon antaŭen puŝante! Ni do trompe enlogas ilin en ian kaveton kaj el supre, el ĉiuj flankoj, ni ilin senhalte pinĉetas, pinĉegas kaj iom post iom disŝiras. Ili falegas kvazaŭ kegletoj... Ifoje ili marŝas en vicoj, nigretas iliaj nigraj kiraso, radias iliaj nigraj okuloj kaj brilegas iliaj akraj, longaj dentoj. Ili saltas kaj flugas de ĉiuj flankoj...

Kaj ŝajnas al la majoro, ke efektive de ĉiuj flankoj alflugas la nigraj griloj-kampuloj. Ili svarmas en la nuboj de tabakfumo, ili flirtas super la kandelo, ili alkroĉas sin al la longaj lipharoj de la majoro. Li penis ilin ekkapti, sed ekkapti ne povas. Kaj la grilo postforna, kiel antaŭe, sidas post la forno kaj rakontas

sian senfinan fabelon, ĉiam pli kaj pli laŭte, kvazaŭ ĉe la orelo mem de la majoro ; ĝi krias senĉese : Ĉil-til ! Ĉil-til ! Ĉil-til ! . . .

— Ni interbatalas jam horon, ni interbatalas la duan, — krias la grilo, — ni ilin pinĉegas, disŝiras, senhalte pinĉas, disŝiras, sed ilin senĉese alvenas grandnombre, kaj fine ili komencas nin venki ; tiam ni forkuras sur la vastan kampon, kaj, kvankam ili, niaj malamikoj, saltas kaj flugas multe pli rapide ol ni, — rekompence por tio ni tiel lerte elturniĝas, ni tiel lerte strekadas ĉiufanken la kapon, ke ne helpas al ili iliaj saltoj, nek iliaj flugiloj. Fine ni trovas la savon post niaj fornoj, kien venos nenia kampulo, ĉar ĝi timas niajn embuskojn kaj kaptilojn. . . . Preskaŭ ĉiutage ni batalas, dum tutaj longaj jaroj. Tio estas senfina, malnova fabelo. Kaj ne venas la fino por niaj malkonsentoj kaj malpacoj. Maljunaj griziĝintaj griloj diras, ke fine alvenos tempo, kiam ĉiuj malpacoj kvietiĝos, kaj ĉiuj griloj fratece kuniĝos en unu popolon, en unu anaron. . . . Jes, evidente tiu feliĉega tempo alvenos tiam, kiam sur la tero restos nenia grilo !

Kantinte sian lastan, malgajan ĉil-til ! la grilo eksilentis. . . .

Kaj la majoro ? . . . Sed la majoro jam de longe nenion parolis.

La kandelo estis finbrulinta, la samovaro malvarmiĝis kaj ĉesis sian bruadon, la pipo estingiĝis, kaj la majoro, kiel vera heroo kuŝis simple sur la planko apud la apogseĝo kaj ronkis heroe.

Ho ! sendube li estis nun ĝuste en Jamajko ! . . .

El la rusa lingvo tradukis ROMANO FRENKEL.

FRANĈJO KIEL KURACISTO

La hundo de kapitano R. estis pli bone nutrata ol multaj homoj de meza klaso. Tiu oficiro, kiu manĝadis en restoracio, pagis ĉiam duoblan porcion de ĉiu manĝaĵo, ĉar la duono de l' manĝaĵo estis destinata por la favorita buldogo. La hundo estis do tiel supersatiĝa, ke apenaŭ ĝi sin movadis kaj eĉ ne povis jam promenadi kun sia mastro, pro troa pezanteco. Manĝinte plensate, la hundo kuŝadis plej ofte sur sofan kusenon, kaj renversante sin de unu flanko sur alian, ĝi nur ĝemadis pro superflua enhavo de l' stomako.

La kapitano multe ĝojis pro diskreskado de l' hunda amplekso, ne pripensante, ke abomenete estas tronutri mal-

laboreman beston, se tiom da malsataj homoj ekzistas en la mondo.

Ĉe la kapitano estis servisto juna, sprita Franĉjo, kies devo, krom aliaj kutimaj okupoj, estis elportadi el restoracio, tagajn kaj vesperajn manĝojn por la buldogo, se tiu ne havis volonton foriradi kun sia mastro.

Franĉjo kun ioma ĵaluzo rigardadis multfoje bongustajn frandaĵojn donatajn al la hundo, dum li mem estis devigata sin kontentigi per simpla soldatnutrado.

Sed fine, la hundo, manĝante ĉiam spicajn kaj multgrasigitajn viandaĵojn, por ĝi tute ne higienaj, komencis iom malsaniĝi. Unu tagon, ĝi estis ankoraŭ pli malvigla ol ordinare; sekvintan tagon ĝi jam ne forlasis la sofon, ĝia rigardo malgajiĝis kaj, el prezentitaj al ĝi manĝaĵoj, ĝi tuŝis apenaŭ ĉiun per sia longa kaprica lango kaj de turnis buŝaĉon, kun plenda-murmuro.

— Iomtempa fasto estus por ci tre saniga, — murmuris Franĉjo, — ci estus tuj resaniĝinta, ci, frandema parazito!

Sed li ne kuraĝis tion ripeti al sia mastro, ĉar pro tia rimarko, li jam unufoje ricevis de li admonon. Li do forprenis de antaŭ la buldogo la leporan pasteĉon kaj bovidajn kotletojn kun novaj terpomoj, kiujn, kiel jam lekitajn de l'hundo, sur telerrando, li abomenis gustumi — kaj forportis ilin el la ĉambro, skuante la kapon.

La apetitmanko de l'favorito malĝojigis la kapitanon, kiu timante por ĝi ian pli gravan malsanon, ordonis venigi bestkuraciston. Tiu, esplorinte la hundon, deklaris, ke ĝi havas nedigesteblecon kaj ekordonis pulvorojn, kiujn la hundo englutadis en buljono, sed ili malmulte ĝin helpis. Plenblovita kaj senmova, ĝi kuŝis malgaje, eĉ ne svingis la voston, por repagi la karesojn de l'ĉagrenita sinjoro.

Ĵus tiutempe, la kapitano ricevis telegrafan sciigon pri edziĝo de sia frato, loĝanta je 30 mejloj. Akirante tuj forpermeson, li preparis sin al vojaĝo. Forveturante, li diris al Franĉjo:

— Nun vi devas zorgi pri la sano de l'buldogo. Alportu al ĝi ĉiutage la menditan restoracimanĝaĵon, sed elektu tiujn, kiuj estas plej digesteblaj. Se ĝia sano malpliboniĝu, alvenigu la bestkuraciston, kiun mi poste pagos malavare. Al vi mi ankaŭ ne ŝparos rekompencan, se mi, ĉe mia reveno, trafos la hundon sana.

Franĉjo adiaŭanta la sinjoron, promesis zorgi fervore pri la sano de l'hundo kaj li pretiĝis ĝuste por tion efektiviĝi.

Tial, vespere, li donis al la malsanulo la lastan pulvoron dissolvitan en pladeto da lakto, sed bongustan rostaĵon, el kiu konsistis alportita vespermanĝo, li eĉ ne lasis al ĝi ekflari, sed manĝis ĝin mem, kun granda apetito. Tio sama okazis pluajn tagojn; ĉiuj restoraciaj alportaĵoj eniĝadis en lian stomakon.

Duan tagon, la hundo sentante sin iom pli malpeza, ekrapis de sur la kanapo kaj alproksimiĝis kun scivolo, al sia zorganto, kiu dume englutadis avide ĝian tagmanĝon.

— Nu, ci estus nur lekinta kaj poste lasinta ĉion, — diris al ĝi Franĉjo; — mi preferas cin anstataŭi.

Trian tagon la buldogo promenante tra la ĉambro kaj svingante ĝojete la voston, montris per sia sintenado, ke ĝi estus volonte ion manĝonta. Franĉjo kunprenis ĝin por promonado, kaj post la reveno li donis al ĝi parton de sia soldata malgraseta nutraĵo. Kaj tia reciproka interŝanĝo daŭris ĝis la fino de l'semajno, kun granda pliboniĝo de la hunda sano kaj kun vera kontentiĝo de Franĉjo, kiu nun unufoje dum sia vivo, gustumis tiajn frandaĵojn.

La okan tagon, la buldogo jam vigla kaj gaja, kuradis en la korto, kaj ekvidinte sian sinjoron, ĵus revenintan el vojaĝo, ĝi saltrapidis al li kaj apogante la piedojn sur lian bruston, eklekis lian vizaĝon.

— Mia buldogo jam sana! — ekkriis ĝoje la kapitano. — Ĉu la bestkuracisto ĝin resanigis? — li demandis la alvenantan Franĉjon.

— Ne, sinjoro kapitano, la kuraciloj estis sen necesaj; mi elektadis por ĝi nur digesteblajn manĝaĵojn, kaj ĝia resaniĝado komenciĝis tuj post via forveturo.

Franĉjo, kiel rekompenco, ricevis ses kronojn de sia mastro. Ĉu li konfesis iam, kiaspeca estis tiu resaniĝado, oni ne scias — nur tio estas certa, ke li neniam al si faris riproĉojn, ĉar li atingis la ĉefan celon per kuracmaniero tiel prudente praktikita.

HELENA HEMPEL.



FELIETONO

Estu heroo!

Hodiaŭ mi rakontos al vi kvankam ridipdan, tamen instruan historieton.

Estis unu bela, malgranda knabeto. Li havis belajn haretojn, bluajn okulojn kaj iom friponetan mentonon. Li estis ankoraŭ malmulte prudenta, sed li havis bonan koron.

Kaj tiu ĉi knabeto posedis hundeton, kiun li tre amis.

Sed ŝajnis al li, ke lia hundeto havis iom tro longan voston — kaj ke estus bezone mallongigi ĝin.

La knabeto sciis, ke la hundeto suferos pro doloro, sed li estis ankaŭ konvinkita, ke tiel longa vosto malhelpas al la hundo kaj ke oni devas tion korekti.

Li ne volis la besteton multe turmenti, kaj meditis, kiamaniere oni povas indulgi la hundeton.

Tiel venis al li ideo, ke la hundo havus grandan doloron, se oni dehakus al ĝi grandan pecon da vosto je unufoje. Tial li decidis, ke li dehakos ĉiutage malgrandan peceton — por ke tio malpli multe doloru — ĝis la vosto estos konforme mallonga. — — —

... Sed mi, karaj junaj amikoj, permesas al mi kuraĝe certigi, ke kiam la vosto jam devis esti mallongigita: — tio devis esti fariĝinta subite.

Kaj mi samtempe certigas, ke oni tiel devas fari ankoraŭ ĉe aliaj aferoj. Se iu volas ĉesi frandi: — li tion faru subite.

Tiel same ankaŭ ĉe la plenaĝuloj. Kiu estas sklavo de drinkado, aŭ de troa fumado, tiu dekutimiĝos plej bone subite.

Estu heroo!

El bohema tradukis — a b —

BIBLIOGRAFIO

La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

Principes Logiques de la Formation des Mots, par RENÉ DE SAUSSURE. Première partie. 122 p. 22 × 19. — Genève, Librairie Kündig, 11, Corraterie. Prezo: Fr. 2.

Tiu ĉi franclingva lingvistika verko estas rezultato de diligenta laboro de nia grandscienca Akademiano, kies nomo estas ja tre konata en la Esperanta mondo. La libro estas aĉetebla ĉe Universala Esperanta Librejo, 10, rue de la Bourse, Genève, kaj ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Vollständiger Lehrgang der internationalen Hilfssprache Esperanto, von J. GLÜCK und Dr. EDMUND SÓS. 100 p. 14 × 20. — Verlag Paul Knepler, Wien, I., Hoher Markt N° 1. Prezo: Kr. 1,50.

Tre bona lernolibro por germanlingvuloj; la aŭtoroj estas gratulindaj kaj dankindaj pro la utila servo, kiun ili faris al nia afero.

Sinjoro Herkules, unuakta burleskajo, de GEORG BELLY, tradukis H. ARNTZ kaj M. BUTIN. 40 p. 10 × 15. — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin S. W., Lindenstr. 18-19. Prezo: 0,10 Sm.

Tiu ĉi tre amuza, ridiga teatraĵo estas facile ludebla; ankaŭ ĝia lego estas agrabla tempopasigo.

La lerta Juĝisto (kaj aliaj rakontetoj), de diversaj aŭtoroj. 30 p. 8 × 24. — Eldonaĵo de « Hungara Studento ». Prezo: 15 Sd.

Enhavo: La lerta Juĝisto, La moko kiel propagilo de Esperanto, Pento, Poemoj, Humoraĵoj, Anekdotoj.

Dresden kaj la Esperantistaro. Gvidlibro. 124 p. 11,5 × 16,5. Friedrich Ader, Esperanto Verlag, Dresden-A. I., Hansahaus (Zahngasse 12. Prezo: 2 respondkuponoj.

Lukse presita, interesa gvidlibro kun ilustraĵoj, kiu detale konigas al ni la urbon de nia kvara kongreso.

La Gildhala Pro-paca kunveno en London. 24 p. 12 × 18. Prezo: unu penco.

Bedaŭrinde, nia malvasta loko nebligas komuniki detalan, laŭmeritan priskribon de tiu ĉi bonega broŝuro; anstataŭ tio do ni varme rekomendas al niaj legantoj aĉeti ĝin, ĉe la Redaktoro S-ro HARRISON HILL, 116, Abbey Road, London N. W., aŭ ĉe British Esperanto Association, Museum Station Buildings, 133-136, High Holborn, London W. C.

Disrompu ni la intermurojn. Respondo de Teosofiano al parolado farita de D-ro A. H. de Hartog en la Wanhana Loĝio de la Teosofia Societo, kun kontraŭparolo de D-ro de Hartog. 14 p. 15 × 21.

La eldonisto P. Dz. Veen, Amersfoort, Nederlando, sendas afrankite ekzempleron tra la tuta mondo tuj post ricevo de *poŝtmandato* de 0.200 Sm.

Skizoj el mia propagandista vivo, verkis A. MARICH. 39 p. 10 × 14. — « La Verda Standardo », Budapeŝt IX., ŭllői-ut 59. Prezo: 36 heleroj (15 Sd.).

La titoloj de tiuj humorajaj skizoj estas: Nia unua ino; Permutacio, kombinacio kaj variacio aŭ malfeliĉa sorto; Religio kaj anarĥismo; La barbo de la Profeto; Kiamaniere mi vojaĝis kongresen?

Oficiala Jarlibro de Centra Asocio Bohema Unio Esperantista. 16 paĝoj, 14 × 21. — « Časopis Českých Esperantistů » (Red. Ed. Kühnl), Praha II, 2023. Dittrichova ul. 6.

Enhavas la nomaron de la Societo, kune kun kelkaj sciigoj.

PEDAGOGIA FAKO

Ankoraŭ pri merizo kaj ĉerizo ⁽¹⁾. — Jen kelkaj aldonoj al artikolo en N° 3-1910.

I. *Cerasus avium* :

1) *Cerasus avium* var. *sylvestris*. Merizarbo.

france : Merisier
ruse : ĉeresnja lesnaja
angle : bird-cherry.

Alta arbara arbo. Frukto preskaŭ nigra, dolĉa, iom *amara*, mola.

⁽¹⁾ Volonte ni publikigas jenan artikolon, kun la rimarko, ke la tutan respondecon ni allasas al ĝia aŭtoro.

- 2) *Cerasus avium* var. *duracina*. Bigarbarbo.

france : Bigarreantier

ruse : čerešnja sadovaja, španka

angle : red-heart or white-heart cherry, bigaroon.

Mezalta ĝardena arbo. Frukto dolča, *malmola*, diverskolora (blanka, flava, ruĝa).

- 3) *Cerasus avium* var. *juliana*. Molbigarbarbo.

france : Guignier

ruse : ŝpanskaja-viŝnja.

Mezalta ĝardena arbo. Frukto dolča, *mola*, akvoriĉa, ruĝa.

- II. *Cerasus vulgaris, caproniana* : — Ĉerizarbo.

france : Griottier ou Cerisier

ruse : viŝnja.

Nealta aŭ malalta ĝardena arbo. Frukto acida aŭ dolĉacida.

P. STOJAN.

HUMORAĴOJ

Ŝanĝo de opinio. — *Edzo* : Mi legas en la ĵurnalo, ke iu edzo mortigis sian edzinon. — *Edzino* : Ha ! la sovaĝa kruelulo ! Tiel barbaraj estas vi viroj ; oni devus ekzekuti ilin ĉiujn, senescepte... — *Edzo* : Ho, ho, nun mi rimarkas, ke mi eraris. Ne la edzo estas la mortiginto, sed la edzino mortigis sian edzon. — *Edzino* : Tre certe la kompatinda virino ne povis plu elporti la terurajn brutalaĵojn de sia edzo, kaj pro tio ŝi liberigis sin de li. Ŝi agis tute prave.

La malhelpilo. — *A* : Vidu, amiko, kiel ŝtrange estas : en tiu ĉi vilaĝo sur ĉiu domtegmento ekzistas cikininesto, nur sur la domo de sinjoro Plensuldowski ne. Kio povas kaŭzi tiun ĉuriozan eviton ? — *B* : Tute nature. Ne estas libera loko sur ĝi. La cikonioj ja estas malhelpataj en la konstruado de nestoj, pro la multaj hipotekoj, kiuj estas ŝarĝmetitaj sur lian domon.

Demando. — Maljunulino vizitas sian amikininon, kies filineto ploras.

— Fi ! kiel malbele estas plori ! — diras la patrino.

— Ho, jes, estas tre malbele, — aldonas la vizitantino, — estas tio, kio poste malbeligas la knabinojn.

La knabino, kun larmoj : « Ĉu vi do multe ploris, sinjorino ? »

Dum konversacio. — « Vi scias, al mi via urbo pli multe plaĉas, ol Madrido. » — « Sed vi ja neniam estis en Madrido ! » — « Tute egale ; mi sur la landkarto ĝin vidis ; nenio eksterordinara. »

Ĉe ĉerklaristo. — « Por tiu ĉi ĉerko cent spesmilojn ? Tro kare ! Ĉu vi volas sesdek ? » — « Ne, mi ne povas, sinjorino. » — « Nu, sepdek. Pli multe por tiela ĉerko mi ne donos. » — « Jen kio, sinjorino, lasta vorto : donu okdek kvin spesmilojn, kaj mi al vi por sama prezo aldone faros malgrandan ĉerkon ; ĝi eble taŭgos por iu el viaj infanetoj. »

Vivĝuanto. — (En klubo.) Estimata Sinjoro, vi ĵus frapis mian kapon per bierbotelo. Tion ĉi mi neniam pardonos al vi... Sciuj : mi kutimiĝis, ke oni min kapobatu ne alie, ol per ĉampanboteloj...

Ĉe antikvaĵisto. — « Kiom kostas tiu ĉi skribotablo? » — “ Tri-cent spesmilojn. ” — « Kial tiom karege? » — “ Ĉar ĝi estas tricent-jara. ” — « Ho, tiaokaze, ĉu vi povas vendi al mi tablon de pasinta jaro por du spesmiloj? ”

Laŭleĝe. — *Ŝtelisto* (kiun la mastro trovis sub la lito): Sinjoro! pardonu! kompatu! Kion vi volas fari al mi? Pro kio vi prenas tiun haĵilon? — *La mastro* (trankvile): Nu, mi trovis vin; do, laŭ la leĝo, mi rajtas preni trionon de la trovitaĵo.

En urbĝardeno. — « Pardonu, sinjoro, ĉu ne via filo ludas tie, kun la infanoj? tiu... tiu bela, ĉarma... tiel dolĉa vizaĝeto, ĥi similas anĝelon. » — “ Jes, kara sinjoro, ĥi estas mia filo. ” — « Do, bonvolu pagi al mi dek spesmilojn; ĥi ĵus detruis mian novan ĉapelon per bastonfrapo, la sentaŭga bubaĉo! »

Aviada terminaro. — *Sinjoro* (en kies poŝon ŝtelisto enmetis sian manon, krias ĝin kaptinte): He, policano! Jen tiu ĉi aviadistaĉo per sia aeroplano enflugis mian hangaron!

Ĉe tribunalo. — *Prezidanto* (tre severe): La unua persono, kiu interrompos, estos tuj elpelata el la... — *Kondamnato*: Bravege!

Kiamaniere helpi? — *Edzino* (al sia edzo): Mia karulo, tute neeble estas paŝi surportante nunmodan jupon. Ĉu vi ne aĉetus aŭtomobilon?

El la soldatejo. — *Rotestro*: Kaj ci! kion ci faras, fuŝulo?... Ĉu ci ne scias pensadi? Sencerbulo! Kial do ci havas kapon? — *Rekruto*: Por ke ĝi malhelpu la suprenlitadon de mia kolumo.

NIAJ KONKURSOJ

Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 ₯, — 2) samon en valoro de 1 ₯, — laŭ elekto de la premiotoj.

Pri nia julia konkurso hazarda ni ricevis 81 respondojn. La unuan premion gajnis F-ino Elisabeto Glück, kiu supozis 80 respondojn; la duan — Rululo, kiu supozis 75 respondojn. La nomaron de ĉiuj partoprenintoj ni publikigos en la venonta numero.

Korespondado de la Redakcio.

En spaco. — La manuskripton, laŭ via deziro, ni neniigis. Saluton!
K. P. S. — Ne estas absoluta kondiĉo, ĝi nur plioportunigas la kompostadon. Cetere, ĝi estas ĝenerala kutimo en la tuta mondo.

P. T. — La du anekdotoj estas tre konataj.

Fr. St. — Ni tre bedaŭras, sed ni ne povas cedi lokon en nia gazeto por via longa, pure persona alvoko.